

& La tempo:

< Ripete 29 sed rekante 24 el 43 batoj por strofo, entute 344 paŝoj dum 4 minutoj.
Verkis Edmond Privat (Tra l' silento, Letchworth 1912). Baladigis Martin Strid (2017)
per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Bonfara Influo de la Alkoholo.>

(#Melodio:

<:43>

(o;So /doododo dododo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;So
doododo dododo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;h

(#Rekantaĵe: miimimi mire dooTiTi do; reerere reedodo TiLa Ti; doododo miidodo
LaaLaLa doLa SooSoSo doododo TiiTiTi do; doododo miidodo LaaLaLa doLa
SooSoSo doodore miirere do;

)×8)+

(&Strofoj:

'1 De l' tempo vokite la vent' en aŭtuno ;
L' arbaron trasiblas betulojn klinante, ;
Kaj orajn foliojn ebriajn de suno ; Kun
revoj plej karaj forblovas konstante.

(×:; **Kantu fiere, kantu en ĉen! ; Paŝu
surtere, ĝin draŝu jen! (; Kune en
rondo ne zorgu pri mondo, tondru la
ĝojo en danca la hal'!)**×2)

'2 Forkuras la tempo, forflugas senfine ;
Neniam trafante l' estonton celatan. ; Ĝi
vivon la nian fortrenas obstine ; Kaj
ŝovas nin kvazaŭ ŝafaron pelatan.

'3 Se restis sur voj' memoraĵo tre kara ;
Kaj provas ni posten rigardi kun ploro, ;
Nin premas en kuro l' amaso homara, ;
Kaj vento foprivas vidaĵon de l' koro.
.....

'4 "Rapidu!" al tempo junulo jen diras. ;
"Ekhaltu!" jen preĝas avulo dolore. ; Al
tag' hieraŭa ĉi tiu sopiras, ; Dum tiun
morgaŭon alvokas tutkore.

'5 Sed ridas la tempo pri homaj deziroj ;
Kaj iras senzorge, la branĉojn faligas, ;
La kapojn blankigas kaj, malgraŭ
sopiroj, ; La trunkojn al morto silente
kurbigas.

'6 Kelkfoje revulo, rutinon lacega, ; L'
amason kurantan forlasas tagfine ; Kaj
monton surrampas, dum suno ruĝega ;
La nubojn per oro vualas musline.

'7 Kaj kantas poeto... kaj lian kantaĵon ;
Al homoj malsupren la vento forprenas;
Sed baldaŭ la tempo ĉielan vidaĵon ;
Forlaŝas kaj lin al kurado retrenas.

'8 Ĝis morto nin ŝovas la tempo guverne,
; Ĉar, malgraŭ turmento kaj spite sufero
; Nin logas la tempo kaj regos eterne ;
Svingante la flagon de l' homa espero.
.....)